

V-19470 / 147

dojap

Bulgara ESPERANTISTO





La partoprenantoj en la konsultiĝo de reprezentantoj de la E-asocioj en la socialismaj landoj, okazinta en ĈSSR (marto 1978)

Redakta komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEK, SIEVA, Marin BĀCEV, Ljuba BOJAGIEVA-Ĥristo GOROV, Asen GRIGOPOV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Abonkotiĝo de «Bulgara Esperantisto» nur jara: por Bulgario — 2 levoj, por socialismaj landoj — 3,80 levoj, por ĉiuj ceteraj — 4,16 levoj aŭ egalvaloro.

Grava eraro estas farita en n-ro 6, paĝo II de la kovrilo: en la presejo oni ŝanĝis la lokon de la kliŝoj. Ni petas pardonon de la legantoj!

Amika renkontiĝo de diverslokaj esperantistoj en u. Bjala

ENHAVO

* * *	La Universala Esperanto-Asocio	1
G. Ĥr. Zora Mladenova	Hans 80-jara	3
Doc. Georgi Dimov.	Zora Mladenova	3
Hans		3
Stefan Conev.	La politika komisaro Vârbănescu	4
I. B.	La memoro pri la heroo restas viva (pri Mladen Blajev).	6
Ivan Noev.	Per Esperanto en Hungario	6
* * *	Komuniko pri la Internacia Seminario „Sciencaj aspektoj de E-o en GDR	7
* * *	Festaraĝo pri la kongreslando	7
* * *	Aktiveco de studento-esperantistoj en Kiev	7
N. Berzinja.	Jubileo de A. H. Tamsaare	8
M. Pomeranceva.	E. Lippe — arda ornitologo	8
Ivan Draganov.	Okazaĵo	8
Nadja Zlatina.	En la sinjoroj de Carevec. Trad. As. Grigorov	10
Nadja Keĥlibarova.	Angelina kaj la maro	10
Ivan Vazov.	Al la libereco. Trad. Simeon M. Simeonov	12
Rajna Konstantinova.	Mia verda papageto	12
Georgi Mihalkov.	Foriro	16
V. Ĉeĥa.	Al la ŝtormobirdo	16
* * *	Vespersonoj. Trad. Nikolao Fedotov	16
Dimitro Haĝiev.	Opinioj pri Esperanto en du lingvosciencaj libroj („Ezikoznanie“ de akad. Vl. Georgiev kaj prof. I. Duridanov kaj „Libro pri la lingvo“ de Franklin Folsom)	16
* * *	Ricevitaj en la redakcio	III
* * *	Dezirataj korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

La Nigra Maro estas aparte ĝuinda dum la suna bulgara somero.



LA UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

La Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas fondita en 1908 j., do ĝi jam fariĝis 70-jara. Ĝia kreo venis laŭ tute natura vojo: ĝin postulis la evoluo de la juna E-movado. Pri tia organizaĵo oni ekparolis tuj post la Unua Universala Kongreso de Esperanto (1905), sed la bezono pri ĝi aparte akriĝis post la konata Ido-skismo (1907). Tiu skismo fendis la Movadon kaj parto de la e-istoj (3—4%) ekiris post la idistoj. Por ĉiuj fariĝis tute klare, ke nur per movada formo oni ne povus sukcese progresigi la internacian lingvon E-o, nek certe defendi ĝin kontraŭ oponentoj kaj malamikoj. Estis necesa organizaĵo kun siaj organoj, agadformoj, organiza disciplino ktp.

La ideo pri internacia organizaĵo de la e-istoj kaptis entuziasme la svisa e-isto Hektor Hodler. En la komenco de 1907, do multe antaŭ la skismo, li komencis eldoni gazeton „Esperanto“, en kiu aperigis liston de E-„konsuloj“ (la postaj delegitoj), kiuj estis pretaj fari praktikajn servojn al diverslandaj e-istoj dum ties vojaĝoj, ĉe informpetoj ks. Tuj post la krizo Hodler ekagis energie, kun junula ardo, kaj jam en aprilo 1908 la organizaĵo estis reala fakto. Hodler havis klaran komprenon, ke ĝi devas havi socian kaj tute ne lingvan karakteron. Por la lingvaj demandoj oni kreis en la sama jaro Akademion de Esperanto. UEA deklaris, ke kiel oficialan lingvon ĝi skceptas E-on tia, kia ĝi estas kreita de Zamenhof, kaj tuj ekuzis ĝin en sia praktika laboro. La ĉefa celo de UEA estis „la plifaciligado de ĉiuspecaj rilatoj inter la diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligo de solidareco inter la membroj“. La organizaĵo deklaris sian neŭtralecon rilate al religio, politiko kaj nacieco. Ĝia oficiala organo fariĝis la gazeto de Hodler „Esperanto“. Sidejo — Ĝenevo. Unua kaj multjara prezidanto — Hektor Hodler (ĝis sia morto en 1920).

En sia vivo dum la sekvaj jardekoj UEA konas periodojn de supreniro kaj degenero, de venkoj kaj malsukcesoj. Sed ĝi ĉiam konservis sian plej karakterizan trajton — uzi praktike E-on por servoj informaj, helpaj kaj turistaj. Ekde 1933 UEA fariĝis federacio el naciaj E-asocioj, sed al ĝi povis aliĝi ankaŭ individuaj membroj. En 1936 pro financaj kaŭzoj oni prenis decidon transporti la sidejon de UEA en Londonon, kie la mastrumelspezoj estis je 50% malpli. Tio kaŭzis akrajn disputojn kaj fine — disdubiĝon. La nove-fondita organizaĵo sub la nomo Internacia Esperanto-Ligo (IEL) ekfunkciis paralele en Londono. La du organizaĵoj denove unuiĝis en 1947 sub la nomo UEA kaj organo „Esperanto“. Ekde 1955 la sidejo de UEA estis translokita en Rotterdam (Nederlando), kie UEA akiris propran domon.

UEA disvolvas ekskluzive gravan por E-o agadon. Aparte utilan rolon ludas ĝiaj delegitoj (ĈD, D, VD kaj FD) — honoraj komisiitoj, kiuj memvole plenumas la taskon respondi al leteroj de diverslandaj e-istoj, fari ser-

vojn per informoj pri komerco, industrio, laboro, salajroj, instruado, turismo ktp.

Ĉiujare UEA eldonas Jarlibron, en kiu estas la listo de la delegitoj, joraj raportoj pri la agado de UEA, sciigoj pri la ekzistantaj fakaj E-asocioj, listo de la E-periodaĵoj, de libroj ka.

Ĉe UEA funkcias Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), magnetofona, filma, libroeldona kaj aliaj servoj, komisionoj pri lernejoj, lernolibroj, ekzamenoj, konkursoj ka.

Ekde 1954 UEA estas en konsultaj rilatoj kun UNESKO — la kulturkomitato de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

Ekskluzive grava parto de la agado de UEA estas la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiujn ĝi ĉiujare organizas en diversaj landoj. Ili estas la plej grandaj kaj imponaj manifestaĵoj de la E-Movado, unikaj en la tuta mondo pro la uzo de unu nura lingvo. Ĝis nun okazis 62 UK kaj en Varno ĉi-jare — la 63-a. En la Unua UK de Esperanto en la franca urbeto Boulogne sur Mer (Bulonjo ĉe Maro) partoprenis 688 e-istoj el 20 landoj. Plej ofte en UK partoprenas inter 1000 ĝis 3000 kongresanoj. Plej amasaj ĝis nun estis jenaj UK: en Nürnberg — 4963 (1923 j.), Budapeŝto — 3975 (1966 j.), Sofia — 3472 (1963 j.), Vieno — 3400 (1924 j.), Warszawa — 3256 (1959 j.), Praha — 2561 (1921 j.), Den Haag — 2512 (1964 j.). ktp. La nuna UK en Varno jam atingis 4200, do ĝi jam okupis la duan lokon en la historio de E-o. La UK de E-o, organizataj de UEA, grave kontribuas por fortigo de la sento de amikeco kaj solidareco ne nur inter la diverslandaj e-istoj, sed ili estas realaj paŝoj ankaŭ en la kulturado de internacia amikeco en la tuta mondo. Samtempe UK ludas grandan propagandan rolon pri E-o.

Sub la tegmento de UEA troviĝas preskaŭ la tuta monda esperantistaro. Konforme al la principo de universaleco de UEA en ĝi povas membri kaj membras kelkdekoj da fakaj kaj specialaj organizaĵoj, uzantaj E-on por progresigi la efektivecon de siaj celoj. Tiaj organizaĵoj, pli-malpli intime ligitaj kun UEA, estas la E-organizaĵoj de junuloj, fervojistoj, poŝtistoj, instruistoj, juristoj, ĵurnalistoj, turistoj, sciencaj laboristoj, medicinistoj, muzikistoj, arkitektoj kaj konstruistoj, aŭtomobilistoj, pachtalantoj, verkistoj, filologoj, filatelistoj, foto-, kino- kaj magnetofon-amatoroj, skoltaj, ŝakistoj, geografoj, matematikistoj, ornitologoj, pupludistoj, blinduloj, katolikoj ka.

Pro sia gvida diversflanka agado UEA estas la plej prestiĝa E-organizaĵo. Ĝi vere estas reprezenta organizaĵo de la tutmonda esperantistaro. Tial devo de ĉiu e-isto, de ĉiu landa E-asocio, de ĉiu faka E-organizaĵo estas membri en ĝi, subteni ĝin per ĉiuj fortoj kaj rimedoj, firmigi la unuecon de la e-istoj pere de ĝi.

La bulgaraj e-istoj kaj ties landa organizaĵo ĉiam estis, estas kaj estos unu el la plej aktivaj naciaj taĉmentoj de UEA. Ili laboras sindone por ĝia plua kreskado kaj florado, konvinkite, ke tiel ili laboras por la progreso de la internacia lingvo E-o, por la triumfo de la althumanaj ideoj pri amikeco kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj, pri paco sur nia planedo.

La Ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris per la alta ordeno „Georgi Dimitrov“ k-don ĤRISTO GOROV, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, lige kun lia 70-jariĝo kaj pro lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj en la konstruado de socialismo en nia lando.

Niajn gratulojn kaj bondezirojn al k-do Gorov pri feliĉa vivo, sano kaj ankoraŭ longa fruktodona laboro por progresigo de Esperanto, por triumfo de la internacia amikeco kaj kunlaboro, por paco kaj socialismo sur la tero!



La 10-an de junio 1978 en la salono de „Dom Naroden Flot“ en Varno laŭ iniciato de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto, Distrikta Estraro de BEA kaj Distrikta Komitato de la Virinoj en Varno, estis organizita jubilea solenaĵo okaze de



la 80-jara datreveno de la naskiĝo kaj 66-jara aktiva E-agado de la veteranino-esperantistino Zora Mladenova Hans.

La salono estis ornamita per E-flago kaj multaj freŝaj floroj. Sur speciala ekrano la filo de Zora — la denaska e-isto inĝ. Mitko Dimčev, kandidato de teknikaj sciencoj en la Supera Maŝin-Elektra Instituto en Varno — projekciis kolorajn diapozitivojn el la pli ol duonjarcenta feliĉa vivo de Zora kaj Ivan Dimčev (Hans). Magnetofono disaŭdigis E-kantojn...

Je la 17,30 aŭdigis „La Espero“. Ĉiuj ĉeestantoj en la salono starante aŭskultis la amatan himnon. || |||||

K-dino Kina Haĝieva — sekretariino de la DK de Patrolanda Fronto kaj prezidantino de DK de la Virinoj en Varno, malfermis la solenaĵon kaj donis la parolon al doc. Georgi Dimov por rakonti pri la vivo kaj agado de Zora Mladenova. G. Dimov estas ŝia „Esperanto-filo“, ĉar en 1922 j. li (kaj Georgi Dolapčiev — konata aganto de la bulgara E-movado) lernis en kurso sub ŝia gvido la lingvon de la internacia amikeco kaj paco.

La jubileulinon gratulis k-dino Haĝieva kaj bondeziris al ŝi sanon kaj ankoraŭ multajn jarojn labori por la disvastigo de E-o. Ŝi enmanigis al Zora Hans freŝajn florojn kaj donacojn je la nomo de la plej amasa organizaĵo en Bulgario — la Patrolanda Fronto. Sekvis multaj gratuloj: de la DE de BEA (G. Dimov), de la plej malnova E-societo en Varno „Albatroso“ (Lili Andreeva), de la plej nova E-societo „Fajrero“ ĉe la Distrikta Popola Soveto (Markrid Karajan), de ĉiuj E-societoj en Varno kaj ĝia distrikto, de la DE de BEA en Plovdiv (Miĥail Dančev), de fratinoj Vergiev — iamaj samklasanoj de Zora Hans, de k-do Belčo Nikolov — Merita Aganto de la Kulturo kaj eksrektoro de la Supera Ekonomia Instituto en Varno (li rememorigis interesajn momentojn el la vivo de la jubileulino el la tempo de la faŝista regado en Bulgario, kiam li, kiel ŝi, estis eksigita kaj persekutita, pro kio li devis forkuri el Bulgario kaj trovi azilon en Sovetunio). Estis tralegitaj multaj gratulotelegramoj, unualoke de CK de BEA.

Ĉiuj volis ĉirkaŭpreni la amatan Zora-n, kisi ŝin kaj fari foton kun ŝi por rememoro.

Emociite Zora Hans esprimis koran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis la solenaĵon, al ĉiuj, kiuj gratulis ŝin. Ŝi deklaris, ke ĝis ŝia lasta spiro ŝi laboros per kaj por E-o kaj tiel kontribuos por baldaŭna veno de la tago, kiam „la bela sonĝo de l'homaro, por eterna ben'efektivigos“.

G. Ĥr.

ZORA MLADENOVA HANS

La E-veteranino Zora Mladenova Hans naskiĝis je la 15/27 de majo 1898 en u. Kjustendil. Ŝi devenas el malriĉa familio — la patro estis popola instruisto, la partino — kudristino. Jam infano, Zora kun siaj gepatroj loĝis en multaj bulgaraj urboj kaj vilaĝoj, kie la patro Mladen Georgiev laboris kiel instruisto. Li estis vera apostolo de la popola klerigo, homo kun progresemaĵ politikaj ideoj kaj pioniro de la bulgara E-movado. Sendube interesita de ŝia

patro, la sciama Zora ellernis E-on tre juna — nur 12-jara (en 1910 j.). Jam en 1912 j. ŝi estis akceptita kiel membro de E-societo „Lumo“ en Veliko Târnovo. Dum la du militoj — Balkana (1912 j.) kaj Inter aliancana (1913 j.) — la malgranda e-istino preskaŭ sola zorgis pri la E-aferoj en la urbo. Dank' al ŝi estis plene konservita la arkivo kaj la biblioteko de E-societo „Lumo“.

Post la Unua Mondmilito la familio de Mladen Georgiev translokiĝis en Varnon.



Ci tie Zora iĝis instruistino kaj membro de E-societo „Fratego“ (la nuna „Albatroso“). Ekde 1922 j. ŝi fariĝis ĝia sekretariino kaj gvidanto de pluraj E-kursoj. En 1924 j. Zora vizitis UK de E-o en Vieno. Grupo de ŝiaj lernantoj salutis la kongreson, kio faris fortan impreson al la kongresanoj. Si neniam forgesas tiun kongreson, ĉar tiam ŝi renkontiĝis kun aŭstriaĵ laboristoj-socialistoj.

En la E-kursoj, kiujn Zora gvidis, ŝi konatiĝis kun Ivan Dimčev (Hanso) kaj ligis kun li sian tutan vivon. En ŝia granda familio estas kelkaj denaskaj e-istoj.

En 1925 j. ŝi kune kun sia patro kaj fratino Vjara Makedonska estis eksigita „kiel komunistino“ por ĉiam el ĉiuj lernejoj. Deknaŭ jarojn, ĝis la tago de la liberiĝo el la faŝismo — la 9-a de septembro 1944 — ŝi estis senigita je la rajto okupiĝi pri sia amata profesio.

En la periodo 1930—1940 Zora studis pedagogion en la Sofia Universitato kaj diplomigis pri tiu fako. Ekde 1944 j. ŝi estis instruistino en Varno ĝis 1958 j., kiam ŝi emeritiĝis.

La literatura verkaro de Zora Mladenova estas notinda. Si verkis multajn artikolojn pri la edukado, recenzojn ka. — en E-o aŭ en bulgara lingvo. Ili aperis en „Bulgara Esperantisto“ (ofte kun la pseŭdonimoj

Avrora Klajn kaj Stela Morbilli), ankaŭ en „Heroldo de Esperanto“, en la bulgarlingvaj revuoj „Drugarĉe“ (Kamaradeto — infana), „Pedagogičeska Praktika“ (Pedagogia Praktiko) ka., en la ĵurnaloj „Vestnik na Ĵenata“ (Ĵurnalo de la Virino), „Zarja“ (Ĉielruĝo), „Varnenska Poŝta“ (Poŝto de Varno), „Varnenski Novini“ (Novaĵoj de Varno), „Ĉerno More“ (Nigra Maro), „Narodno delo“ (Popola Afero) ka.

En la E-movado Zora Mladenova Hanso okupis gravajn postenojn: sekretario kaj prezidanto de E-societo „Albatroso“, membro de la DE de BEA en Varno, membro de la Centra Estraro de BEA. Pro sia aktiva multjara E-agado ŝi ricevis la altajn titolojn „Honora Prezidanto de E-Societo Albatroso“ kaj „Honora Membro de CE de BEA“. Sindona, ekzemple laborema kaj obstina, ŝi edukis generaciojn de e-istoj, kiuj rajte ŝin nomas „La Patrino de Esperanto en Varno“.

Hodiaŭ nia kara jubileulino diras: „Nun mi penadas malrapidigi la paŝojn de mia vivo, por povi ankoraŭ ĝoji pri la supreniro de mia socialisma patrolando. Tutan vivon mi batalis sub la verda kaj la ruĝa steloj sur la standardoj de Zamenhof kaj Lenin. Kaj mi estas feliĉa!“

Doc. Georgi Dimov



Stefan Conev

LA POLITIKA KOMISARO D-RO VÂRBAN GENĈEV

(60 jaroj ekde lia naskiĝo)

Kun d-ro Vârban Genĉev, naskita je la 26-a de julio 1918 en v. Sjarovci, distrikto de Gabrovo, mi konatiĝis pli proksime en la printempo de 1937. Mi estis laboristo en Drjanovo, kaj li — lernanto-abituriento. Ni jam sciis, ke li estas unu el la aktivaj remsanoj¹ en la gimnazio. Dezirante krei pli intimajn ligojn inter la laborista, lerneja kaj studenta junularo ni, grupo da remsanoj, organizis ekskurson al la Monaĥejo de Drjanovo, kie ni pasigis tutan tagon. De tiam komenciĝis nia konkreta kaj celdirektita kunagado kun Vârban.

¹ Remsano — membro de RMS (Rems) — Laborista Junulara Unuiĝo (junkomunista).

Nia unua renkontiĝo lasis ankaŭ la unuajn impresojn kaj rememorojn pri li. Malgraŭ ke Vârban estis per 2—3 jaroj pli juna ol ni, li superis nin en idea-politika rilato. Vârban distingiĝis per la apartaj kvalitoj de homo, kiu kapablas rapide proksimiĝi al la ceteraj, esprimi laŭ plej natura maniero siajn kamaradecajn sentojn, esti amasulo.

Tio, kio nin altiris kaj gajnis por ĉiam, estis lia simpleco en la rilatoj al ĉiuj, lia modesteco kaj sincereco, lia senrezerva fido al la kamarado, lia preteco helpi lin tuj, se li bezonus helpon. La gaja kaj iom petola karaktero de Vârban ankoraŭ pli ornamis lian bonecon, sincerecon kaj fi-



demon kaj tiuj lastaj montriĝis ankoraŭ pli klare.

Nia kunagado kun Vârban Genčev manifestiĝis pleje en la aktiva eksterleĝa batalo kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo en la periodo de 1941—1944 j. Dum tiuj jaroj li jam estis studento de medicino kaj fariĝis kuracisto. Jes, kuracisto, sed tuj — ekde la aŭtuno de 1942 — li fariĝis eksterleĝa, jam havante mortverdikton de la faŝista tribunalo. Dum la batalo Vârban manifestiĝis kiel elstara partia funkciulo. En rememoroj pri li Boris Kopčev, komistiito de CK de la komunista partio por la VIII partizana operacia zono, interalie skribas: „Estas homoj, kiuj parolas pri si nur tiam, kiam ili postulas ankoraŭan ŝarĝon. D-ro Vârban Genčev estis tipa reprezentanto de tiu kategorio de batalantoj. . .“.

Vârban estis ĉiufanke disvolviginta personeco kaj kiel lernanto kaj studento, kaj kiel esperantisto, abstinulo kaj stenografo, kaj kiel partizano. Ĉiam li subigis siajn personajn interesojn al la partiaj, al la popolaj. Kiel kuracisto li rezignis pri persona kariero kaj bonstata vivo. Nura supera amo ekzistis por li — la amo al la libereco kaj la popola feliĉo. En sia letero li skribas: „Nun la tempo estas tia, ke malgraŭ ĉio ni devas direkti niajn fortojn al la alia, pli supera kaj altira amo — la amo al la libereco kaj la popola feliĉo. Tiu amo inspiras nin ĉiujn kaj kreas deziron por pli kaj pli da laboro kaj sindonemo. . .“ Por tiu ĉi pli supera kaj altira amo Vârban Genčev, jam politika komisaro de la partizantaĉmento de Gorna Orjaĥovica, pereis en v. Ĉapaevo en malegala batalo kontraŭ la popolaj malamikoj.

Vârban Genčev estis unu el la gvidantoj de E-societo „Flamo“ en la Knaba Gimnazio de Veliko Târnovo. Li bonege scipovis kunigi la leĝan kun la neleĝa laboro de RMS. Tion li aparte manifestis dum la semajno por popularigo de la internacia lingvo

E-o en la printempo de 1937. La semajno devis transformiĝi en potencon alvokon al la lerneja junularo pri frateco kaj solidareco kun la aliaj popoloj. La polico iel donis sian permeson pri ĝia okazigo.

Vârban estis en la centro de la preparlaboroj. En ĉiu momento li manifestis sian sagacan sindetenon, takton kaj kapablon regi sin samkiel regi ankaŭ la ceterajn. Ĉiu povas imagi, kiel malfacile oni povas ekregi entuziasmigitan, incititan kaj bolantan pro indigno amason de junaj homoj, pretaj ĉiumomente sin ĵeti kun nudaj piedoj kontraŭ la legionanoj² kaj la polico. Por ekregi tian agordon oni devas havi eksterordinaran parolĉarmon. Ĉe Vârban la parolo ne estis tondra, nek minaca, nek ordona. La forto de lia logika penso, de lia sinregado, la el lia tuta figuro radiantaj kvieto kaj ekvilibro kaŭzis ĉiam trankviligon kaj sobrecon, estingadis la superfluan passion. Eĉ dum la ferma matenfesto en la salono de popola legejo „Iskra“ la partoprenantoj en la belarta programo kaj la publiko ne embarasiĝis, ne lasis sin esti influataj de la provokoj, kiam furiozantaj legionanoj piedbruis kaj frapis sur la pordoj per zonoj, per ligno- kaj ferpecoj. Tiel la agitsemajno pasis je la nivelo de granda politika manifestaĵo, sen incidentoj. Por tio sendube multe kontribuis Vârban.

Li saĝe utiligis E-on por korespondi kun progresemaĵoj el multaj landoj. Dum la periodo 1934—1938 j. Vârban havis ligojn kun e-istoj el USSR, Francio, Nederlando, Ĉeĥoslovakio, Hispanio (el kie li dum la jaroj de la civila milito ricevadis revuon „Popola Fronto“). Korespondante, li rakontis pri la peza sorto de sia popolo sub la boto de la faŝismo, akiradis adeptojn de la komu-

² Legionano — membro de la plej aroga tiutempe faŝista organizaĵo Unuiĝo de la Bulgaraj Naciaj Legionoj.

nismaj ideoj kaj la internacia laborula solidareco. Ankaŭ nun estas konservitaj leteroj kaj poŝtmarkoj, ricevita de li el eksterlando. Pri la amo de V. Genĉev al E-o parolas ankaŭ la fakto, ke li kiel studento de medicino presigis por si esperantlingvajn vizitkartojn. En la somero de 1938 li partoprenis la kongreson de la bulgaraj e-istoj en u. Sevlievo.

Vârban tre bone uzis E-on ankaŭ en sia praktika laboro. Ofte dum neleĝaj renkontiĝoj, kiujn ni ordinare efektivigis sub la formo de ekskursetoj al la Monaĥejo de Drjanovo, al Buzluĝa, Krâstec ka., li atente, per singardaj replikoj en Esperanto, sciigis kien ni devas iri, kie kaj kiam

okazos la renkontiĝo, avertis pri danĝeroj ktp. La proksimiĝo de la remisanoj al la fiksita loko devis okazi nerimarkite de malbona okulo. Ofte dum tiuj renkontiĝoj en la improvizitaj belartaj programoj oni deklamis kaj kantis ankaŭ en E-o — Vârban estis iniciatinto kaj ĉefa plenumanto tiurilate.

Dum sia malfacila kaj danĝera vivo de eksterleĝa aganto, de partizana politika komisaro la arda e-isto d-ro Vârban Genĉev batalis por siaj altaj idealoj ĝis la lasta spiro. Por la estontaj generacioj li lasis helan, senmortan ekzemplon kaj modelon de vera patrioto kaj internaciisto.

ORGANIZA VIVO

LA MEMORO PRI LA HEROO RESTAS VIVA

En v. Stiĵerovo, distrikto de Târnovo, okazis rememoriga solenaĵo lige kun la 40-jariĝo ekde la pereco de Mladen Blaĵev — junkomunista organizanto kaj fondinto de E-societo en la vilaĝo.

Antaŭtagmeze en la lernejo estis organizita granda kunveno, kiun ĉeestis ĉiuj lernantoj, instruistoj kaj la direktorino. Rememorojn pri Mladen Blaĵev rakontis lia frato Ilija, esperantisto, kaj Kânju Miĉev. Lia fratino Todorka kaj junpioniroj recitis versaĵojn.

Je la 17 h. antaŭ la domo de la popola

soveto kolektiĝis pli ol 200 homoj — proksimuloj kaj estimantoj de Mladen el Stiĵerovo, el la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj el la urboj Pleven kaj Sviŝtov. Frunte kun la vilaĝa blovorkestro, kun kronoj kaj floroj, la procesio direktiĝis al la tombo de Mladen. Tie okazis ceremonio. La orkestro ludis lian ŝatatan kanton „Mia preĝo“ de Ĥristo Botev kaj funebrajn marŝojn. Oni parolis pri la vivo kaj batalo de Mladen. Estis plenumita konvena belarta programo.

I. B

Per Esperanto en Hungario

Kazanlâk kaj la hungara Nadjkaniĵa estas fraturboj. Amikaj frataj rilatoj kreiĝas ankaŭ inter la e-istoj el ambaŭ urboj.

Pasintjare gastis al nia E-societo „Roza Valo“ e-istoj el Nadjkaniĵa. Ĉi-jare grupo de niaj e-istoj frunte kun la societa prezidanto K. Ĉindin gastis al niaj hungaraj amikoj. Ni traveturis Hungaron, vizitis u. Sopron, kie troviĝas la palaco de princo Esterhazi — „la Malgranda Versaĵlo“, nun muzeo. En speciala ĉambro estas eksponitaj komponaĵoj de Hajdn, kreitaj en tiu palaco.

Poste ni vizitis la lagon Balatono kaj la internacian junpioniran palacon apud ĝi. En tiu palaco ĉiujare ripozas ĉ. 3000—4000 infanoj. En u. Peĉ, kiun ni ankaŭ vizitis, ni trarigardis la mirindan trezoron de la fajenca muzeo. Poste ni veturis al la milita tombaro en Harkani, kie kuŝas la ostoj de multaj bulgaraj soldatoj, pereintaj dum la milito kontraŭ la germanaj faŝistoj.

Ĉiuloke dum nia unusemajna restado en Hungario nin ĉirkaŭis amikeco kaj helpemo.

Ivan Noev



pri la Internacia Seminario «Sciencaj aspektoj de Esperanto», aranĝita inter la 17—23 de aprilo 1978 en Ahrenshoop, GDR

Laŭ la invito de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio, kunvenis el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio 31 fakuloj pri interlingvistiko, esperantologio kaj sciencaj kaj fakaj aplikadoj de E-o por pritrakti sciencajn rezultojn kaj ĝenerale trarigardi la situacion sur la menciitaj kampoj kun la celo signi la plej gravajn direktojn de la scienca agado kaj ties bazajn antaŭkondiĉojn por la sekva kelk-jara periodo.

Post aŭskulto kaj pridiskuto de 31 prelegoj la partoprenintoj konstatis, ke la interesiĝo kaj aktivado pri sciencaj esploroj sur diversaj kampoj de interlingvistiko dum la lastaj jaroj konsiderinde plifortiĝis kaj same iĝis konsiderinda kaj pli celhava la aplikado de E-o sur sciencaj kaj fakaj terenoj. Dum la diskutado iĝis evidenta, ke estas kelkaj kampoj, sur kiuj necesas forigi gravajn mankojn, ĉefe en la organiza kaj informada terenoj. Tio estas antaŭkondiĉo por pli intensa evoluigo de la scienca laboro mem.

Konsiderante, ke interlingvistikaj esploroj havas esencan signifon por la solvo de la monda lingva problemo, estas nepre necese plu disvolvi la ĉi-rilatan sciencon laboron.

Specialan atenton oni devas dediĉi al la kontentigo de la lingvaj bezonoj de la scienca

kaj faka komunikado. La ĝisnunaj sperto kaj faktoj pruvas, ke E-o estas plej taŭga kiel interlingvo ankaŭ por la scienco. Tial estas necese disvastigi la aplikon de Esperanto sur ĉiam pli multaj sciencaj kaj fakaj terenoj. Tio nepre signifas ankaŭ intensigon de la fakterminologia laboro.

Estas grave kreskigi la proporcion de la utiligo de E-o en la sciencoj. Sajnas laŭcele, ke la fortostreĉoj estu farataj kaj por la bazaj sciencoj (filozofio, matematiko, fiziko ktp.) kaj, laŭ eblecoj, por la unuopaj aplikataj sciencoj. Por atingi la supre prezentitajn ĝeneralajn celojn estas bezonataj establo, respektive plibonigo, de efikaj organizaj kaj informadaj sistemoj, ekzemple: organizo de interlingvistikaj laborgrupoj internaciaj kaj naciaj, estigo de internacia instituto utiliganta E-on por ĉiuj branĉoj de la scienco, establo de landaj kaj centra informaj kaj kontaktigaj servoj koncerne eldonaĵojn, aktivadojn kaj adresarojn).

Estas konsilinde, ke la diversloke aranĝataj kaj diverstipaj naciaj kaj internaciaj kunvenoj de esperantistaj sciencistoj ĉiam turnu sian atenton ne nur al la konkretaj sciencaj problemoj, pro kiuj ili kunvenis, sed ankaŭ al la perspektivaj bezonoj de la scienco koncerne la uzadon de la internacia lingvo E-o.

Festaro pri la kongreslando

En la lasta numero de „Aŭstria Esperantorevuo“ aperis informo pri festkunveno en Vieno, organizita de la kulturfako de la ambasado de Bulgario en la personeco de ĝia direktoro Petro Germanov kaj de la Aŭstria Esperantista Asocio (de ĝia flanko unualoke de Emil Vokal, vicprezidanto).

Alparolis la publikon prof. d-ro Beckmann, prezidanto de Aŭstria E-Federacio. Li esprimis la intereson de la aŭstria e-istoj al la 63 UK, al la kongresurbo kaj lando.

Sekvis koncerto, prezentita de Rumjana Bareva el la Sofia Opero, Cvetan Konstantinov — koncertpianisto, Fani Palikruševa — pianistino kaj la kvarteto „Vâlčev“ el Sofia. Oni spektis ankaŭ sonfilmon pri Bulgario. Post la filmo — koktelo kaj amikaj konversacioj.

Aktivecoj de studentoj-esperantistoj en Kiev

Ĉiujare printempe en la konservatorio „P. I. Ĉajkovskij“ en Kiev, USSR, okazas scienca krea studenta konferenco. En ĝia programo regule estas ankaŭ priesperantaj temoj, pri kiuj raportas membroj de la E-rondo ĉe la konservatorio, gvidata de s-nino doc. Ekaterina Majburova, konata ankaŭ al niaj legantoj kiel kunlaborantino de „BE“.

En la ĉi-jara 45-a Scienca krea Studenta Konferenco kun ĝenerala temo „Aktualaj problemoj de la disvolvigo de la nuntempa muzikarto“ kune kun la diversaj sekcioj partoprenis ankaŭ sekcio „Esperanto“ per 3 raportoj: „Revuo de la E-periodaĵoj“, „La E-movado en Kiev“ kaj „La bulgara kantisto-esperantisto M. Zdravev“.

Ĉi-jare la homaro notas la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de la elstara estona verkisto Anton H Tamsaare. Lian celebron rekomendis ankaŭ UNESKO, ĉar la verkoj de la talenta prozisto apartenas ne nur al la estona popolo, sed ankaŭ al la tuta homaro. Pritio atestas la multnombraj tradukoj el Tamsaare en multajn lingvojn de la mondo. Lia nomo estas konata ankaŭ al la e-istoj. En 1976 j. la estona eldonejo „Eesti Raamat“ eldonis esperantlingve lian romanon „La mastro de Korboja“.

La 100-jaran jubileon de la verkisto celebris ankaŭ la e-istoj. En la E-klubo de

Riga okazis vespero dediĉita al la vivo kaj verkado de Tamsaare. Pri la krea vivo de la verkisto rakontis la prezidanto de la Talina E-klubo Jan Ojalo, kiu gvidis delegitaron el Estonio speciale por tiu ĉi celo.

En la belarta programo de tiu vespero sonis ankaŭ estonaj popolkantoj en E-o, plenumitaj de rigaj e-istoj. La gastoj el Talin havigis agrablan surprizon: spekti kolorajn diapozitivojn pri Varsovio. Oni montris la straton „D-ro L. L. Zamenhof“, la tombon de Zamenhof, straton „Esperanto“, la junularan kafejon „Esperanto“ ka.

Laŭ N. Berzinja

ĈU VI SCIAS, KE...

...lernolibroj de E-o estas en 55 lingvoj?
...la unua en la mondo E-muzeo estas fondita en Vieno en 1912 j.?

...ĉiun trian tagon en la mondo aperas libro en E-o?

...la Unua Kongreso de la Rusa Ligo de la E-istoj okazis en 1919 j. en Peterburgo?

...en Talin libroeldonejo „Eesti Raamat“ aperigis ankoraŭ unu libron en E-o — „Estona Soveta Poezio“? En la kolekto estas prezentitaj 36 poetoj, tradukitaj de la estona E-poetino Hilda Dresen.

Redakcia noto. La materialojn „Jubileo de A. H. Tamsaare“, „Ĉu vi scias, ke...“ kaj „E. Lippe — arda ornitologo“ ni ĉerpis el n-ro 105/1978 de j. „Sovetskaja Molodeŝ“ (Soveta Junularo), organo de CK de Lenina Komso-nolo en Latvio, USSR.

E. Lippe—arda ornitologo

Ĉiuprintempe en la Pedagogia Lernejo de Riga okazas Tagoj de la Birdoj, kaj ilin plej aktive partoprenas la kunlaborantino de la lernejo Elvira Lippe — aktiva membro de la E-klubo en Riga, membro de la Internacia Societo de Esperantistoj-Ornitologoj kaj elstara E-poetino. La amo al la naturo helpis al ŝi fariĝi amatora ornitologo kaj la vasta korespondado en E-o kun sovetaj kaj eksterlandaj ornitologoj-amatoroj faris ŝin posedanto de tre interesa kolekto, kiu rakontas pri la vivo de la birdoj en la tuta mondo. La kolekto konsistas el albumoj, fotoj, poŝtmarkoj, gramofondiskoj kun voĉoj de birdoj.

M. Pomeranceva

POEZIO kaj BELETRO

Ivan Draganov

OKAZAĴO

Stefĉjo eksilentis, ĵetis rigardon al mi, poste turnis sin al la ceteraj ĉeestantoj en la ĉambro kaj diris:

— La parolon havas nia amiko Pavel, kiu ĵus revenis el fremdlando. Ni ĉiuj petas lin rakonti impresojn.

Mi ne estis preta por longa parolado, sed ankaŭ ne deziris rifuzi.

— Karaj geamikoj, mi alifoje rakontos al vi detale pri mia vojaĝo. Nun mi profitas la okazon rakonti pri iu interesa okazaĵo dum mia restado fremdlande.

Mi gastis ĉe mia filo kaj bofilino, kiuj nun loĝas en Okcidenta Germanio. Ili posedas malgrandan hundon,

nomatan Ilo. Guste pri Ilo mi deziras nun rakonti. Pri Ilo kaj pri io pli.

Ilo estas hundeto nigra kiel diablo, kun krispa hararo, vera astrakano. Tre bela, inteligenta kaj ruza estaĵo el la raso „pudelo“, kun artistaj inklinoj. Simile al iu ĵonglisto ĝi povas facile elpoŝigi mian naztukon. Alifoje kunportas diversajn objektojn, ekzemple miajn babuŝojn. Ilo ŝatas ludi per pilko kaj plenumas la rolon de golulo. Ĝi majstre povas kapti la pilkon en la aero kaj pro ĝojo komencas svingeti la voston.

La hundeto ofte akompanis min tra la urbo dum miaj promenadoj. Mi



devas diri al vi, ke ĝi estas tre bona amiko de la infanoj. Ni ofte preterpasis iun lernejon kaj kiam ni troviĝis apude, la infanoj, rimarkinte nin, tuj alkuradis kaj komencis karesi ĝin. Ilo ankaŭ kaŝole lekis al ili la manojn, ĝoje svingetante la voston. La infanoj ĉiam regalis ĝin per iu frandaĵo. Ilo esprimis sian dankon per vostosvingado kaj ĝoje ridetantaj okuletoj.

Iun fojon, post disiĝo kun la infanoj, ni kutime daŭrigis nian promenadon. Juna virino, atinginte nin, ĵetis rigardon al la hundeto, ekridetis al ĝi gaje kaj daŭrigis sian vojon. Subite io falis teren de ŝi. Ilo rimarkis tion, tuj forte elŝiriĝis el miaj manoj kaj ekkuris antaŭen. Ĝi proksimiĝis al la falinta objekto, kaptis ĝin per la dentoj, atingis la virinon kaj komencis salteti antaŭ ŝi. Unuamomente tio timigis ŝin, sed baldaŭ ŝi trankviliĝis, kompreninte kio okazis, kaj komencis karesi la hundon. Evidentiĝis, ke la perdita objekto estas ŝia eta monujo. Proksimiĝinte mi rekaptis la ĉeneton de la hundo. La virino komencis danki al mi, plue karesante Ilon. Samtempe ŝi ekparolis al mi germane. Bedaŭrinde, tiam el la germana mi komprenis nur kelkajn frazojn, plej akurate la frazon: „Mi ne komprenas germanan“. Sed jen la virino ekparolis angle. Mi denove nenion komprenis. Tamen la virino ne ĉesis rideti kaj denove tre ĝentile demandis: „Ĉu vi hazarde ne parolas Esperanton, sinjoro?“

En la momento mia verda steleto ne estis surbruste — ĝi restis sur la alia kostumo hejme. Mi ruĝiĝis, ke mi ne kunportas la Esperantan insignon, sed samtempe ĝoje respondis tuj:

— Jes, estimata sinjorino, mi parolas Esperanton, mi estas esperantisto.

Ni ambaŭ ekridis ĝoje. Mia hazarda konatino evidentiĝis anglino, nomata Elza Nilson. Ŝi donis al mi sian adreson kaj ĝentile invitis min viziti ŝin. Mi promesis fari tion.

Si sciigis al mi ankaŭ sian telefonnumeron. En la difinita tago kaj horo mi telefonis kaj vizitis mian novan samideaninon Elza. Kia granda estis mia surprizo, kiam mi vidis, ke en la ĉambro atendas min ankaŭ kelkaj viroj kaj virinoj, ĉiuj kun la verda steleto surbruste. Samideanino Elza prezentis min, kaj ni komencis vigle interparoli. Ili petis min rakonti ion pri Bulgario.

Plezure mi kontentigis ilian scivolemon, informante ilin pri la ekonomia, kultura kaj scienc-teknika supreniro de mia lando. Mi rakontis ankaŭ pri la batalo denia popolo kontraŭ la faŝismo kaj nun kontraŭ la instigantoj de nova milito — por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Komprenoble, oni tuj demandis min ankaŭ pri la Esperanto-movado en Bulgario, kaj mi koncize priskribis ĝin. Plej detale mi rakontis pri niaj prelaboroj por la Universala Kongreso de Esperanto en Varno, pri la Junulara Kongreso en Veliko Tŕrnovo kaj pri la Infana Kongreseto en Varno, ankaŭ pri la baldaŭa inaŭguro de la Internacia E-Lernejo en Pisanica apud Smoljan. Nature, mi invitis ilin viziti nian sunan Bulgarrion. Ili gaje aplaudis min kaj promesis fari tion.

Jen kiel mia malgranda nigrhara amiko, la hundeto Ilo, feliĉigis min per novaj amikoj kaj gajnis ankaŭ amikojn por mia patrolando.



EN LA SINOJ DE CAREVEC

Dediĉita al la Internacia Junulara E-Kongreso 1978 en Veliko Târnovo — Bulgario

Silentiĝis. Kongres' estas for.
Jantra sorĉe fabelojn refrenas.
Inspirite en tiu ĉi hor'
milde Târnova vento spirĝemas.

Jam kvietas mistere la mond',
plenas ĝi je legendoj pasintaj.
Kaj ekfloras la koroj kun pomp'
en junula kongres' burĝonintaj.

Staras Carevec¹ en la mallum'
kaj ĝin steloj ornamas per krono.
Kun mantel' el radioj de lum'
Kalojan² supreniras al trono.

Reviviĝas en tiu ĉi hor'
Balduen³ kaj reĝino Maria,
kaj okazas festen' ĝis aŭror',
kaj ekflamas batalo furia.

La popol', la boljaroj, la car'
kunpuŝiĝas en tiu epoko,
kaj la ondoj ribelaj de mar'
disbatiĝas al Carevec-roko.

Glavoj tintas en fajra batal',
brulas lando kaj brulas pasioj.
Fosas teron la huf' de ĉeval',
flamas flagre ĉielincendioj.

De Trapezica⁴ vlnas kun flam'
hom' post homo, ĉeval post ĉevalo.
Ilin gvidas denove Ŝiŝman⁵
kontraŭ horda invad' en batalo.

Venu, kara gaste, venu do
kaj sattrinku el fonto de gloro!
Ĉerpu fajron de brava hero' —
de l' antikva bulgara popolo.

Enamiĝu al mia naci',
ĝi hardiĝis en ŝtormoj teruraj
kaj trans granda dislima lini'
ĝi nun iras al tagoj lazuraj.

Ni kuniras en tiu vesper'.
Nia junco flugila seren...
La ŝaŭmanta antikva river'
pramalnovajn kantojn refrenas.

Kio do, ke ne konis mi vin
ĝis ĉi tiu kongreso fabela?!
La junula kongres' ligis nin
per fidelo amika kaj hela.

El la bulgara: Asen Grigorov

^{1,4} Carevec kaj Trapezica — altaĵoj en Veliko Târnovo, kun krutaj deklivoj, pitoreske ĉirkaŭitaj de r. Jantra. Dum la Dua Bulgara Ŝtato sur Carevec loĝis la caroj, la korteganoj, la patriarko kaj la boljaroj (nobeloj) kaj sur Trapezica funkciis ĉ. 20 preĝejoj.

² Kalojan—bulgara caro (reĝo) inter 1197—1207, kiu en 1205 disbatis la kruckavalirojn kaj kaptis viva ilian gvidanton, la imperiestron Boduen (Balduin) de Flandrio.

³ Balduin de Flandrio, gvidanto de la Kvara Kruckavalira Militiro, disbatita kaj militkaptita de Kalojan en 1205, enprizonita en turo en Veliko Târnovo, nomita poste Balduin-Turo, kie li mortis.

⁵ Ivan Ŝiŝman — la lasta bulgara caro de la Dua Bulgara Ŝtato, kuraĝe batalinta kontraŭ la turkoj.

Nadja Keĥlibarova

ANGELINA KAJ LA MARO

La maro... Por pluraj homoj ĝi estas nur dekoracio de la somera libertempo, nur granda akva surfaco. Iufoje ĝiaj koloroj — ofte senigitaj je brileco aŭ sin ripetantaj — lasas la homon indiferenta. Iufoje nesupozitaj danĝeroj, kaŝitaj en ĝiaj profundaĵoj, maltrankviligas, eĉ forpuŝas lin. Sed mi kreskis sur la bordo, kien venas — ŝaŭmanta kaj siblanta — la nelacigebla ondo por frapiĝi sur la rokegojn, por forsendi al la ĉielo etajn akverojn, por sterni sur la tero

longajn blankajn ŝalojn, por forviŝi la spurojn de paŝoj sur la sablo kaj post momento retiriĝi kunportante dum sia kurado ŝtonojn, mitulkonkojn kaj fortan odoron je jodo... Mi memoras bone: dum miaj infanjaroj en la klasĉambro estis petoluloj, tial ĉirkaŭ la mezo de majo ni eliradis surfingre el la kvartala lernejo kaj mal-supreniĝis laŭ vojeto inter arbustoj kaj vitoj al la humida kurbiĝo de la golfo. Frue ni ekscipovis naĝi. Kun malordaj haroj ni kolektiĝis ĉe



vesperiĝo sur la korto de Irka kaj en konkuro rakontadis pri niaj planoj. Plej allogaj estis la planoj de la knaboj. Senescepte tiuj petoluloj revis estiĝi maristoj kaj kapitanoj! „Sed knabinojn oni ne akceptas en la Maristan Lernejon! Timulinoj ja vi estas, la knabinoj! Evidente oni ne bezonas vin!“ — mokridis surdige la apudsidantaj petoluloj. Kial ankaŭ la infaneco iufoje estas kruela? Tiutempe mi ne direktis tiun demandon al mi. Tiam mi estis kaptita de ebriga sento: mi komencis envii. Ĝis larmoj mi enviis al la knaboj dum la tiamaj vesperoj en Varno, kiam mi malkovradis la mondon. Kaj mi komprenis, ke por mi la maro ĉiam similos larĝe malfermitan ĉirkaŭprenon al io nekonata kaj impete alloga, al malproksimaj novaj bordoj, ornamitaj per novaj havenoj kaj novaj amikoj.

Mi bone memoras: kiam mi aŭdis pri Angelina Baltova, mi tuj komencis verki versaĵon. Tiutempe ŝia nomo ĵus komencis famiĝi en la maristaj medioj, ĵus komencis aperi en la gazetoj. Profunde emociis min la fakto, ke bulgara virino sukcesis, jes, nerefuteble sukcesis fariĝi ŝipkapitano, venkanto de la mara senlimo. Min kaptis deziro laŭeble plej baldaŭ respeguli ŝian sentimon, ŝian internan belecon, kiuj ŝajnis al mi evidentaj. Vere, ankoraŭ mi ne renkontis Angelina-n Baltova-n, sed mi mem konvinkadis min, ke mi sukcese ŝin pentrus, dank'al la prahistoria neesplorita sento, specifa por ni, la virinoj. Jen estas ŝi: hardita bulgarino en eleganta uniformo de mara oficiro, demetinta sian kolon sur la fortajn ŝultrojn. Iom bruniginta pro la mara suno kaj la saloportanta vento estas ŝia kuraĝa vizaĝo. Fiere brilas la pupiloj: „Rompis min nek konvenciaĵoj kaj klaĉoj, nek ŝtormo kaj longedaŭra navigado!“ Apenaŭ post du aŭ tri jaroj mi havis la okazon interkonatiĝi kun Angelina Baltova kaj. . . mi mutiĝis konsternita: trompita mi

estis de la neesplorita kaj eble neekzistanta „virina sento“. Miraklo okazis tiam en miaj pensoj kaj sentoj; la varmecoj, kiun mi portis por la juna navigistino, ekbrulis. Sed la fajro de la envio, kiu ebrigis per sia funebra kaj vundiga brilo tiom da momentoj el mia infanaĝo, neatendite estingiĝis; ja Angelina Baltova estis gajninta la venkon kaj por si kaj por mi! Si venkis la primokojn de la iamaj knaboj el Varno. Si leviĝis super ĉiajn ajn limigitecojn kaj rigidecon, ĵetintajn pezajn ankrojn en la imagojn de iuj homoj. Tio parenigis min kun Angelina por ĉiam. Kaj mi senvorte komencis nomi ŝin mia fratino. Mia pli juna, sed heroa fratino.

Kapitano Baltova estas svelta, blondhara virino, kiu kvazaŭ nedelonge disiĝis kun sia lerneja teko, kun la sinĝenemo kaj la naiveco. Kiom da tempo devis forpasi, ĝis mi ekkredis, ke tiu virino kun eksteraĵo de malgrasa, ŝajne nerezistopova knabino, estras ŝipojn kaj vaporŝipojn, direktas la volon de ordinara maristoj kaj maroficiroj, filtras tra la kribrilo de la sendormeco la zorgojn pri ŝipmaŝinoj, ŝipŝarĝoj kaj vojaĝantoj, sukcese ekregas ondigaŭntan maron, stelmapojn kaj radarajn signalojn. Sed mi iom post iom forgesis pri mia unuamomenta miro, venkita de nova malkovro: Angeilna rapidis subigi min per sia. . . kvieta obstino.

Jam kiam mia konateco kun Angelina festis sian printempan sezonon, mi komprenis, ke en tiu kvieta obstino sin kaŝas io tre esenca pri la karaktero de la juna marnavigistino. Kaj nun, kiam mi komprenas, ke mi konas ŝin pli bone, mi substrekos tiun kvaliton: Angelina scipovas deteni la atenton ĉu de amiko, ĉu de malamiko, uzante sian molan malcedemon. Mole ridetos Angelina, mole diktos unu aŭ alian demandon, mole ripetos du- eĉ trifoje sian demandon kaj finfine devigos vin respondi. Mole ŝi petos vin pri tio aŭ alio, mole

ripetos por dua kaj tria fojo sian peton kaj finfine devigos vin plenumi tion, kio al ŝi ŝajnas prudenta kaj necesa.

Jam kiam mia konateco kun Angelina festis sian printempan sezonon, mi divenis ion tre esencan en ŝia venko. Neniam Angelina rezignis pri siaj revoj. Kaj tiu nerezignado ĉiam ŝanĝiĝis kaj daŭre ŝanĝiĝas en delikatan, sed certan ŝlosilon por la pordegoj, naskiĝintaj sur la vojo al proksimaj kaj malproksimaj triumfoj. Gis kiam vivos, Angelina postsekvos siajn revojn. Kun milda obstino, kun

mola malcedemo por Angelina la revo ĉiam estos granda lampiro, okulo de lumturo: ties brilo kondukas vin tra la severa akceptejo de la admiralo kaj la severaj kancelarioj de la bulgara Mara Floto, tra la severa statuto de la marnavigado kaj la buntaj proŝaŭmo surfacoj, tra la centoj da obstakloj kaj danĝeroj sur la apudborda tero kaj la akvo. Kaj vi atente postiras la lampiron, sekvas la okulon de la lumturo. Vi eksentas, ke mem la persekuto de la revo kunigigas kun la plej profunda senco de via vivo.

Ivan Vazov

AL LA LIBERO

Diin' terura de l'Libero,
mi vin respektas kun ador'!
Vi nin inspiras al ofero,
kaj flamas por vi nia kor'.

Kaj antaŭ via flag' reĝkronoj
paligas, skuas sin la mond';
de vi naskiĝas la Dantonoj —
detruas tronojn via ond'.

Vi donas al la sklavo forton
batali por vi kun impet';
vi plibonigas lian sorton,
mortintojn levas per trumpet'!

Sed estas blindular' alia:
ne tuŝas ilin via glori';
komerce, ĉe altaro via,
blasfemas ili sen honor'.

Majo 1883

Rajna Konstantinova

MIA VERDA PAPAGETO

Anfaŭ du jaroj, en frosta decembra frumateno, vekis min plorpepado de birdo kaj malfortaj frapetoj sur la fenestro. „Iu malvarmiĝinta pase-ro!“ — mi pensis kaj rapide ellitiĝis. Mi malfermis la fenestron kaj... ho, kia surprizo! Sur la ekstera kornico de la fenestro saltetis de unu kruro sur la alian ĉarma verda papageto kun flava vizaĝo... Mi atente etendis la manon por ne timigi ĝin.

per kri': «Kun la popol' ni estas!»,
sed ĝin tenante en katen';
aliaj: «Por liber' ni estas!»,
sed sufokante ĝin sen ĝen'.

Ekzistas sklavoj katenitaj,
liberaj, tamen, nomas sin;
kaj estas pastroj hipokritaj —
neniel respektante vin.

Libero, levu dian glavon,
per ĝi solene venĝu vin
kaj frapu la ebrian sklavon
per koto makulanta vin!

Descendu, frapu tiun hordon —
frap' estos bona lecion',
kaj pruvu vian veron, ordon
per la potenc' de via tron'!

El la bulgara: Simeon M. Simeonov



raĝis movi mian rigidiĝintan manon kaj atente observis la birdon. Kia simfonio de koloroj, kia simetrio de buntaj makuloj kaj linioj! Herbe-verda korpo, flava vizaĝo kaj verto, sub la beko kolĉeno de malhelbluaj punktoj, la flugiloj verdaj kun nigraj linioj, garnitaj per flavaj kaj nigraj festonoj, la vosto — elegantaj buntaj plumoj, du el kiuj aparte longaj, malhelbluaj. Kia ĉarmo kaj majstraĵo de la ĉiopova naturo!

La birdeto vekiĝis kaj fulmrapide alflugis sur la kurtenstangon. Kiam mia edzo eniris la ĉambron, ĝi ekpepis gaje kaj sidiĝis sur lian kapon. Ege mirigite li ne moviĝis, nur rigardis min scivole. Mi rapide rakontis al li, kio okazis. Li, samkiel mi, multe ekĝojis pro la neatendita verda gasto. Ne sciante ĉu ĝi estas in- aŭ virseksa, ni donis al ĝi la neŭtralan nomon Loli.

Kaj komenciĝis tagoj kaj monatoj de vera ĝojo kaj plezuro, kiujn havigis al ni nia verda papageto. Loli imitis la pepadon de la paseroj, kiuj kutimiĝis veni sur la balkonon por finmanĝi la reston de ĝia falaro¹. La intonacio de ĝia pepado informis nin, ĉu ĝi ĝojas aŭ suferas, ĉu timas, jubilas aŭ sopiras eliri al la paseroj. . .

Ĉar ni ne metis ĝin tuj en kaĝon, Loli kutimiĝis vivi en la ĉambro libere. Ĝi tranoktis sur kaŭĉuka azenido, kiun mia nepino metis en la angulon de la ĉambro, sur la kurtenstangon. Pli poste amikino donacis al mi kaĝon, kaj mi dufoje provis enkaĝigi ĝin, sed ĝi nek kantis, nek bekis falaron, kaj fine sukcesis mem sin elkaĝigi. Tiam ni decidis lasi ĝin libera en la ĉambro.

Mia filo pendigis sur la plafono balancilon. Dum la tago Loli balanciĝis tie, flugis tien-reen, bekis la dikajn foliojn de la fikuso, formangiĝis la delikatajn florojn de la japanaj violetoj kaj de la pelargonio. Furioze ĝi forĵetadis planken ĉiun fremdan objekton, kiun mia nepino

metis en ĝian „neston“, t. e. sur la lokon, kie troviĝis ĝiaj falaro kaj akvo.

Mi pendigis sub la balancilo platan skatoleton kaj metis en ĝin vitrajn oranĝkolorajn perlojn. Loli kutimiĝis atingi ilin kun mirinda precizeco, pendante kun la kapo malsupren. Ĝi prenis per sia beko la perlojn unu post alia, ĵetis ilin planken kaj rigardis scivole, kien ili falos. . . Kiam ĉiuj perloj estis elĵetitaj, ĝi jubile svingis la flugilojn, surstangiĝis kaj ekatendis. Ĝia tuta korpo esprimis streĉitecon, petolemon, pretecon tuj denove alflugi. Mi metis la vitroperlojn en la skatoleton — kaj Loli ekatakis! Ĝi eĉ ne atendis, ke mi formovu min de tie. Kaj tiel la ludo ripetiĝis dek aŭ pli da fojoj!

Kortuŝa bildo prezentis Loli antaŭ la spegulo. Ĝi prenis per sia beko semon de falaro, kokete proksimiĝis al la imagata alia birdo, trenante la flugilojn kaj tenere murmurante. . . Ĝi klukis simile al kokino, kiu logas siajn idojn. Ripetinte tion plurfoje, ĝi fine ekkoleris, iris malantaŭ la spegulon, sukcesis renvensi ĝin, timigite ekpepis kaj atendis, ke mi starigu ĝin. Mi eĉ devis formovi ĝin per la mano. . . Kaj la amindumo komenciĝis denove!

Loli komprenis iujn vortojn kaj instigojn. Kiam mi demandis ĝin (bulgarlingve): „Kie estas Loli?“ — ĝi svingis la flugilojn kaj klare respondis: „Tuk-tuk!“ (tie-ĉi, tie ĉi!). Al mia demando: „Kiu kantas tiel bele?“ ĝi balbutis: „Loli, Loli!“ Kiam mi proponis al ĝi fingron aŭ krajonon, ĝi sentime alflugis. Mi diris: „Loli, kisu min!“ — kaj ĝi delikate tuŝis per sia beko miajn lipojn aŭ nazon. . .

Loli estis vera sismografo. Horojn antaŭ hajlo, ŝtormo aŭ tertremo ĝi maltrankvile flugis tien-reen kaj di-

¹ Falaro: kanaria milio, semo por birdoj.

rekte al mi, ĉirpis laŭte, kaj fine, senpere antaŭ la naturfenomeno, kaŝis sin en sia angulo, metis la kapon sub flugilon kaj silentis. . .

Sennombraj estas la petolaĵoj de Loli. La loko ne permesas al mi rakonti pri ĉio. Sed aparte frapa estis ĝia talento kanti. Komence ĝi kantis al si mem por dormigi sin — ege dolĉe kaj melodie. Kiam mi por la unua fojo funkciigis la gramofonon metinte sur ĝin diskon kun kantoj de Lili Ivanova², Loli tuj jubile ekkantis, tiel sukcese ekimitis, ke mi miregis! Ĉiam denove kaj denove mi faris la provon, ĝis fine ĝi tre ekzakte imitis unu melodion. Mi diris: „Kantu, Loli!“ — kaj ĝi ekkantis. „Pli laŭte, Loli!“ — kaj ĝi tiel laŭte kantis, ke ni ne povis ne ridi pli laŭte ol ĝi. . .

Kiam mi interparolis kun miaj gastoj-esperantistoj iom pli ekscitite, Loli alproksimiĝis, rapide movis la kapon kaj kriis, kvazaŭ riproĉante nin. . .

Venis sublima momento por Loli. Amikino, kiu devis forveturi, lasis ĉe ni la kaĝon kun sia blua papageto Koko. Unue Loli ekĉirpis laŭte kaj rapide forflugis, sed baldaŭ revenis kaj senproteste eniris la kaĝon, kies pordeton mi malfermis. Ambaŭ birdetoj komencis kisi unu la alian, etendante la korpetojn supren kaj tuŝante sin per la bekoj, ĉe kio ili eligis strange tenerajn, karesajn sonojn. . . Kiam venis la horo por posttagmeza dormo, Loli sidiĝis sur la balancilon kaj fermis la okuletojn. Sed Koko provis forpuŝi ĝin. Loli rigardis ĝin konsternite kaj konfuzite, kaptante sin pli forte per siaj ungetoj. Ĝi evidente ne deziris forlasi la novan lokon. Koko tamen sukcesis renversi ĝin. . . Loli hirtigis la plumaron kaj sidiĝis sur la skatoleteto kun falaro kaj dormis tie. Poste ili denove petolis. Loli, mia bonkora papageto, ne estis vengema. . .

Evidente Loli denove eksopiris la liberon ekster la kaĝo. Laŭ siaj spertoj ĝi komencis levi per la beketo la pordon de la kaĝo, sed ĝi ĉiam denove falis. Kaj — stranga fenomenot! Hazarde mi kaj mia edzo povis observi ĝin: Koko kaptis per sia beko la pordeton kaj tenis ĝin, ĝis Loli elflugis! Tiam, kvazaŭ pentante sian agon, Koko ĵetis sin en la kaĝo, furiozis, malgaje ĉirpis. Loli tuj sidiĝis sur la kaĝon, kie ĝi pasigis multajn horojn dum la tago kaj la tutan nokton. Poste Loli denove eksopiris eniri la kaĝon. Kaj Koko denove helpis ĝin, tenante la pordeton per sibeko. Ili tuj komencis kisi kaj senina sektigi unu la alian, fermante la okulojn pro ĝuo kaj sidante en tre maloportunaj pozoj. . .

Sed. . . La feliĉo estas ĉiam mallongedaŭra! Jen venis ĝia fino por ambaŭ birdetoj. Mia amikino revenis kaj vizitis nin por preni sian papageton. Nepriskribebla momento! Loli forflugis de sur la kaĝo kaj komencis maltrankvile ĉirpi. La samon faris Koko en la kaĝo. Ambaŭ birdetoj kvazaŭ ploris. Mi ankaŭ ekploris. . . Longe post la foriro de Koko Loli daŭrigis, eĉ en la dormo, tremi kaj ĉirpi maltrankvile. . .

Mia amikino rakontis al mi, ke Koko mortis post kelkaj tagoj. Antaŭ ol koni Loli ĝi trankvile vivis en sia kaĝo. Sed poste ĝi deziris fuĝi. Ili lasis la kaĝon malfermita. Unue heziteme, Koko poste komencis malerte flugi en la ĉambro. Post kelkhora flugado ĝi falis, sango aperis el ĝia beketo, ĝi ekbaraktis per la flugiloj kaj post unuhora agonio mortis. . . Eble ĝia koreto krevis.

Loli denove kutimiĝis al la libero kaj la soleco. Mi devis esti enhospitaligita pro kormalsano. Tutan monaton mi forestis de mia hejmo. Paralele kun la sopiro al miaj hejmanoj, mi sopiris ankaŭ pri mia verda kantisto Loli. . .

Kortuŝa estis la momento, kiam mi, post la elhospitaligo, denove eniris la ĉambron. Mi demandis: „Kie es-

² Lili Ivanova: elstara bulgara kanzonkantistino.



tas Loli?" Fulmrapide ĝi alflugis proksimen, eksvingis la flugilojn kaj prononcis: „Tuk, tuk!“ Mi etendis la brakon, Loli sidiĝis sur mian fingron, forflugis kaj denove venis. Ĝi sentime, sed delikate bekis mian nazon, la vangon, la lipojn. La rondaj okuletoj brilis gaje kaj petole, la smeralda korpeto tremis pro ĝojo. Loli evidente jubilis. Ĝi rekonis min kaj ĝojis! Mi estis forte kortuŝita!

Sed... La feliĉo forflugis rapide kaj senrevene! Mia ĉarma smeralda papageto forlasis min por ĉiam. Ĝia korpeto kuŝas nun en la arbaro, de kie ĝi verŝajne venis antaŭ du jaroj por variigi mian vivon kaj feliĉigi min... Antaŭ du semajnoj ĝi subite ekmalsanis. Ĝia voĉo malaperis, la kruroj paraliziĝis, ĝi falis de sur la kaŭĉuka azenido sur la ŝrankon, apud sia falaro. Laŭte ekplorinte, mi proksimiĝis kaj prenis ĝin en la mano. Ĝi rigardis min per siaj rondaj febraj okuletoj, la beketo rapide fermiĝis kaj malfermiĝis, ĝi tremis la tuta. Kun larmoj mi demandis: „Kie estas Loli?“ — sed respondo ne venis. Kiam miaj larmoj falis sur ĝian korpeton, Loli skuis la kapon, spasmoj trakis ĝin, ĝi hirtigis la plumaron, sed la dolĉa gorĝo eligis nenian sonon... Ĝiaj kruretoj estis etenditaj malantaŭen, la ungetoj senhelpe interplektitaj, renversitaj en diversaj direktoj. Mi atente metis ĝin en la kaĝon. Komence ĝi provis beki falaron de mia manplato, ripozante post ĉiu movo, kaj akceptis guton da akvo de mia malsekigita fingro, fermante la lacajn okuletojn. Iom post iom ĝiaj ungetoj kaj la beko kvazaŭ krevis, ĝi ne plu povis uzi ilin. La okuloj, kiuj pli frue tiel gaje kaj petole rigardis min, nun elradiis suferon, timon, senhelpon. Mi metis Loli en la angulon de la kaĝo, por ke la lumo ne damaĝu al ĝi, sed ĝi trenis sin ventre kaj venis antaŭ la pordon de la kaĝo, de kie rigardis min, movante la kapon al la direkto, en

kiun mi iris... Mi adaptis lulilon de ŝtofo inter du vergetoj, similan al infana lulilo. Tie mi ofte metis la lacan, konsumiĝintan korpeton, por ke ĝi iom ripozu. Eĉ en sia agonio mia liberama papageto malamis la kaĝon kaj strebis al la pordeto, kiun ĝi neniam plu sukcesis malfermi... Tagnokte, dum multaj horoj, mi deĵoris antaŭ la kaĝo, aŭ tenis Loli en mano, karesante ĝin, parolante al ĝi kun larmoj...

Estis la dekkvina tago post ĝia malsaniĝo. Mi ion mastrumis en la kuirejo. Subite mi eksentis deziron vidi mian papageton kaj rapide eniris la ĉambron... Strange longa kaj trankvila, Loli kuŝis antaŭ la spegulo sur sia dekstra vango, kun fermitaj okuloj kaj beko. La kruretoj estis etenditaj malantaŭen, la ungetoj kortuŝe interplektitaj, kiel manoj de mortinto... Mi laŭte ekploris kaj prenis ĝin en manon. Ĝi estis ankoraŭ varmeta. La kapo kliniĝis antaŭen... Loli, ho Loli, mia fidela amiketo, kial vi forlasis min por ĉiam?! — mi plorgemis. Loli silentis, jam rigida. Kviete kaj liberigita de la suferoj estis la esprimo de ĝia flava — pli flava ol ordinare — vizaĝo. Mi ploris kaj kisis ĝiajn fermitajn okulojn, la smeraldan korpeton, kiu ne plu eligis varmon...

Mi metis Loli en konvenan lignan skatoleton, sur laŭrajn branĉetojn, kiujn ĝi kutimis beki estante sana, kaj fotis ĝin per kolora filmo por eterna rememoro. Posttagmeze mia edzo enterigis ĝin en la arbaro, sub maljuna kverko, sur kiu printempe gaje kantas centoj da birdoj, kaj kie ni kutimas ripozi, promenante en la arbaro. Mia verda amiketo ripozas en digna loko. Kiam la kverko kovriĝos per pompa foliaro, mi vizitos la etan tombon, en kiu ripozas mia fidela amiketo, mia dolĉvoĉa kantisto, kiu konsolis kaj feliĉigis min du jarojn...



Nokto rapide trapasas,
nokto neniam atendas.
Morgaŭ vi forveturos,
morgaŭ sun' ne aperos.

Ĉu jam forflugis la tagoj —
helaj, mirindaj kaj buntaj?
Ĉu song' belega vi estis
en mia dormo profunda?

Plaŭdas kaj tremas la ondoj,
vento karesas la maron.
Lasta vespero nun estas.
Kial la kisoj amaras?

Morgaŭ vi forveturos.
Morgaŭ fore vi estos.
Maron kaj bordon kaj kisojn —
ĉu ni iame forgesos?

V. Ĉeĥa

Novosibirsk

AL LA ŜTORMOBIRDO

Ŝtorma vento blovas tra la maro,
kaj nubegoj flugas al la bordo.
Kion perdis vi sur tero, kara?
Kion serĉas vi, strebante ŝtormon?

Ĉu deziras vi akiri gloron
aŭ rapidan morton volas arde?
Sed allogas min mirakla forto,
alta streb', vidante vin hazarde.

J. Kozlov

VESPERSONOR'

(Malnova populara rusa kanto)

Vespersonor', ho sonorad'!
Meditojn vekas sonkaskad'
pri naskoland', pri patra dom',
pri mia am' de juna hom',
kaj kiel je l'disiga hor'
lastfoje sonos la sonor'.

Ne venos plu serena temp'
de mia trompa vivprintemp'!
Kaj kiom jam ne vivas nun
da tiuj el la gaja jun'!
Profundas dorm' de l'morta kor' —
ne vekas ĝin vespersonor'!

Mi same kuŝos en la ter'!
Malgajajn sonojn de l'vesper'
disportos vent' tra vala sin',
kantist' alia iros ĝin,
ne mi, sed li jam kun angor'
kantados pri l'vespersonor'!

El la rusa: Nikolao Fedotov

OPINIOJ PRI ESPERANTO EN DU LINGVOSCIENCAJ LIBROJ

Bulgara . . .

Ĉi-jare aperis la kvara eldono de la libro „Ezikoŝnane“ (Lingvoscienco) de akademiano Vladimir Georgiev kaj prof. Ivan Duridanov*. Ĝi estas lernolibro por la studentoj de la filologia fakultato, tamen prezentanta intereson ankaŭ por larĝa rondo de legantoj, kiuj interesiĝas pri la problemoj de la lingvoscienco.

Por la ordinara leganto precipe interesaj estas la ĉapitroj „Esenco de la lingvo“, „Origino de la skribo“, „Origino kaj evoluo de la lingvo“ kaj „Klasifiko de la lingvoj“. Ili ĉiuj estas verkitaj de akademiano V. Georgiev, monde fama bulgara lingvosciencisto kaj granda amiko de Esperanto (Pri li vidu la artikolon, publikitan en n-ro 2 de „BE“, 1978).

Por la e-istoj la libro estas aparte valora pro la fakto, ke en la ĉapitro pri la klasifiko de la lingvoj la aŭtoro ne forgesis mencii ankaŭ la „artefaritajn internaciajn lingvojn“. En subĉapitro sub tia titolo, indikante, ke ĝis nun estas faritaj multnombraj provoj (pli ol 350) por kreo de artefarita internacia lingvo, li substrekas, ke „plej konvena el ĉiuj tiaj lingvoj montriĝis Esperanto, kies kreinto estis la varsovia kuracisto L. Zamenhof (1887)“. Plue li donas jenan koncizan karakterizon de la lingvo: „La gramatiko de Esperanto estas perfekte simpla: ekzemple la finaĵo de la verboj por prezenco estas ĉiam -as, por paseo -is, por futuro -os, por volitivo — u ktp. Ĝia vortaro ampleksas la internacian leksikon, la ceteraj vortoj estas ĉefe el la latinidaj lingvoj. Esperanto estas kompare rapide lernebla kaj estas disvastigita en multaj landoj.“

La mencio de E-o kaj ties pozitiva karakterizo en tiaspeca verko estas valora kontribuo por la korekta aprezo de nia lingvo fare de la filologoj.

. . . kaj usona

En 1977 j. la moskva eldonejo „Progres“ aperigis en eldonkvanto de 50 000 ekzempleroj duan, relaboritan luksan eldonon de la ruslingva traduko de la libro de Franklin Folsom „Kniga o jazike“ (Libro pri

* Ezikoŝnane, Eldonejo Nauka i izkustvo, Sofio, 1978 j., 360 p ĝoj, eldonkvanto 20,012.



la lingvo). La originalo estis eldonita en Nov-Jorko en 1963 j. sub la titolo „Language Book“. La libro estas riĉe ilustrita.

La aŭtoro de la libro estas fama usona populariganto-filologo. Vive, interese kaj tre sprite li rakontas pri la apero de la lingvo el la neartikulaciitaj sonoj, pri la origino de la skribo, pri la grandega nombro de la lingvoj en la mondo, pri tio, kiom ili estas malsamaj kaj samtempe similaj rilate ion ĉefan, pri tio, kiel multe da interesa staras malantaŭ ĉiu vorto de la lingvo.

La libro estas aparte valora por la e-istoj pro la favora rilato de ĝia aŭtoro al E-o kaj ĝenerale al la problemo de la internacia lingvo, kiun li tuŝas kelkloke lige kun la traktado de diversaj lingvaj problemoj.

Tiel en la ĉapitro „Kiel oni mem povas inventi lingvon“ Franklin Folsom montras E-on kiel ekzemplon por la ebleco krei artefaritan lingvon. Por pruvi la utilon de E-o li rakontas jenajn epizodojn:

„En Nederlando fine de la Dua Mondmilito multe da infanoj malsatis. Ili estis devigitaj veturi en fremdajn landojn, kien ili povus esti nutrataj. Feliĉe, en diversaj landoj multaj familioj estis pretaj doni al la fuĝintoj kaj nutraĵon kaj loĝejon, tamen ne ĉiuj familioj povis esprimi kiel varme ili kompatas la malgrandajn nederlandanojn kaj kiel ili deziras helpi ilin. Ja ne ĉiuj scipovis paroli nederlandan lingvon. Sed inter la fuĝintoj estis infanoj, kiujn tio ne embarasis. Krom sian gepatran lingvon ili parolis ankaŭ en la lingvo, kiu nomiĝas Esperanto, kaj ili iris en tiajn danajn kaj svisajn familiojn, kie oni ankaŭ parolis en E-o. Ekde la unua minuto tiuj infanoj kaj la homoj, donintaj al ili rifuĝejon, perfekte komprenis unuj la aliajn.“

Folsom klarigas, ke E-on „inventis homo, kiu decidis, ke ĉiuj homoj en diversaj landoj bezonas simplan, alireblan manieron paroli unu kun alia“. Li substrekas, ke la inventinto de la lingvo decidis eviti la komplikajojn de la nature aperintaj lingvoj, kiuj havas multegon da reguloj kaj krome nemalmultajn esceptojn el ĉiu regulo, kreante lingvon, en kiu estas entute 16 reguloj kaj eĉ ne unu escepto.

Lige kun la diversskemeco de lingva konstruo la aŭtoro defendas la korektan koncepton pri la potencialaj eblecoj de ĉiuj lingvoj disvolviĝi.

En la ĉapitro „La popoloj interparolas unu kun alia“ la aŭtoro tuŝas la lingvan problemon en UNO. Li substrekas, ke „eĉ se sur la tero estus multaj miloj da kvalifikitaj sinkronaj tradukistoj, ili ne scipovus fari ĉiujn tradukojn, kiuj devas esti faritaj“ kaj „ke nenia tradukanto alportos tiom da utilo, kiel se du homoj interparolos sen iu ajn peranto“. Folsom venas al la konkludo

pri la neceso de speciala komuna lingvo kiun la homoj ellernos ekde infanaĝo kune kun sia gepatra lingvo. Al la starigita de li mem demando: ĉu kiam ajn la angla lingo aŭ ekzemple la rusa lingvo fariĝos internacia lingvo, en kiu ekparolos la tuta mondo, Folsom respondas: „Nenio estas certa.“ Li havas antaŭvide la fakton, ke la loĝantaro de iuj landoj, kie oni parolas en aziaj lingvoj, kreskas multe pli rapide ol tiu de la landoj, kie oni parolas en angla, en rusa aŭ en kiu ajn alia eŭropa lingvo.

La aŭtoro pritraktas la problemon pri la internacia lingvo ankaŭ en la ĉapitro „La universala lingvo“. En tiu ĉapitro li esprimas la korektan koncepton, ke la ununura lingvo ne sufiĉas, por ke la homoj por ĉiam ĉesu mortigi unuj la aliajn, ke male — la estigo de paco kreas kondiĉojn por la disvastigo de ununura lingvo. Li tamen rekonas, ke la lingvaj barieroj forte malhelpas la homojn. Plue, indikante, ke por la venko super la lingvaj barieroj estis kreitaj jam ĉirkaŭ 300 internaciajn lingvojn kaj menciante kelkajn el ili — kosmos, okcidental, parla, spokil, universal, volapjūk, novial, ido, li substrekas, ke el ili Esperanto estas la plej konata kaj plej populara, precipe en Orienta Eŭropo, kie oni parolas en multaj lingvoj. Folsom informas, ke ekzistas pola radiostacio, kiu ofte disaŭdigas programojn en E-o, kaj ke en la tuta mondo tiajn programojn disaŭdigas pliaj 30 radiostacioj.

La libro de Franklin Folsom estas grava propagandilo de E-o inter la junularo. Ĝi meritas esti tradukita en E-on.

Dimitro Haĝiev

Ricevitaĵ en la redakcio

— PACO, n-ro 3/1978, oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), (bul. „Hristo Botev“ 97, 1303 Sofio, Bulgario)

SCIENCA MONDO — n-ro 1/1978 organo de la Internacia Federacio de la Sciencaj Laboristoj (bul. Tolbuhin 18, 1000 Sofio, Bulgario)

HUNGARA VIVO, n-ro 2/1978, dumonata revuo de Hungara E-Asocio (H-1368 Budapest, Pf. 193, Hungario)

BUDAPESTA INFORMILO, 6/1978, monata oficiala informilo de la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA (H-1443 Budapest, Pf. 153, Hungario)

REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO (Franca Esperantisto), n-ro 308/1978, (en franca kaj E-o), eidonaĵo de Unuiĝo Franca por E-o (4 bis, rue de la Cerisaie — 75004 Paris, Francio)

LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE (La Esperantista Laboristo), n-ro 30/1978, (en franca kaj E-o), organo de la Federation Esperantiste du Travail (179 rue Ordener, 75018 Paris, Francio)

ESPERANTISTO SLOVAKA, n-roj 3—4/1978, monata organo de Asocio de E-istoj en Slovaka Socialisma Respubliko (E. V. Tvarček, Hodžova 1939/6, 91101 Trenčín, Ĉeĥoslovakio)

STARTO, n-ro 2/1978, organo de Ĉeĥa E-Asocio (Jilska 10, ĈS-11000 Praha 1, Ĉeĥoslovakio)

DER ESPERANTIST, n-ro 6/1978, organo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR (108 Berlin, Charlottenstr. 60)

INTERNACIISTO, n-ro 1/1978, organo de Kolektivo Esperantista Komunista (A-8704-Leoben, Aŭstrio)

REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO, n-ro 25/1978, informa organo de Portugala E-Asocio (R. Dr. Joao Couto, 6, r/c.-A, Lisboa 4, Portugalio)

LA REVLO CRIENTA, n-ro 4/1978, Japana E-Instituto, Tokio-Hongo 2-2-14, Japanujo

deziras korespondi

Bulgario

Emilija D. Božilova — str. Asen Halačev 71, 4004 Plovdiv (16-j. lernantino — grafiko, sporto, muziko)

Nadja Karčeva — str. Gurguljat 38, 1324 Sofio (16-j. lernantino — muziko, libroj ktp)

Kostaĉin Karčev — frato de Nadja, la sama adreso (16-j. lernanto)

Asen Linov — selo Aleksandrovo, Loveŝko (67-j., pri filozofio, literaturo ka)

E-istoj de 20 ĝis 60 j. deziras korespondi tutmonde. Komuna adreso: Klubo de Marica, bul. „Bulgario“, 4230 Asenovgrad.

Natalija Ĥristova — str. Ŝejnovska 1, 6100 Kazanlâk (13-j. lernantino)

Milena Haĝieva — str. Gen. Simeon Simeonov 8, 6100 Kazanlâk (15-j. lernantino)

Bonka Jakova — str. P. Manalov 13, p.k. 18, 6100 Kazanlâk (11-j. lernantino)

Ljuba Koleva — str. P. Manalov 18, p.k. 11, 6100 Kazanlâk (11-j. lernantino)

Georgi Miĥajlov — str. Gurko 4, 6100 Kazanlâk (11-j. lernanto)

Margret Ĥristova — str. Ŝejnovska 1, 6100 Kazanlâk (11-j. lernantino)

Ĵulieta Ilieva Petkova — str. Diĉo Petrov 2, bl. 3, ap. 15, Rudozem (17-j. muziko ka)

Fratinoj Rosica Vasileva Georgieva (23-jara) kaj Evdokija V. Georgieva (20-jara) — str. Karlovska 144 (203), 4003 Plovdiv (turismo, sporto, teatro, kino, muziko)

Lernantinoj 14-jaraj — tutmonde — bk, pk, fotoj — el u. Stara Zagora 6000: Jen

la adresoj:

Aneta Tod. Ilieva — str. G. Dimitrov 69-A; Radka Germanova Jeljazkova — str. N. Nikolov 35; Ĥristina Dimova Ilieva — str. Stracin 2; Marlena Dim. Zločevska (12-jara) — str. D. Blagoev 123-A, ap. 12; Valentina Iv. Koleva — str. Bâlgarsko Opâlčenie 60 B, ap. 12; Marija Dimitrova Dineva — str. Rodopi 42; Irina Iv. Georgieva — str. Prof. Beljaev 3; Dimitrina Ĥristova Stojanova — str. Balaton 9; Svetlana Enulova, str. N. Nikolov 175, ap. 12.

Stojan Vâlev — str. Oŝamska 77, Loveĉ (38-j. fraŭlo)

Ivan Petrov — v. Dojrenci, Loveŝko (28-j. fraŭlo)

Temenuĵka Toteva Ĥristova — bl. 107-a, vĥod V, Loveĉ (19-j. fraŭlino — en angla kaj E-o)

Sovetunio

VNIIPVTORGCVETMET — Interklubo (Sciencesplora Instituto), ul. Lagutenko 14, 340103 Donek, USSR (diversaĝaj e-istoj)

ESPERANTO-KLUBO, Abonkesto 6410, 454116 Ĉeljabinsk-116, USSR

Zoja Skvorcova, Molodogvardejskaja 59 (por Esperanto-Klubo „Velo“), 443099 Kujiŝev, USSR (diversaĝaj)

Johannes Palu — Solme 21 (por la Esperanto-klubo), 290016 Tallinn, USSR (gelernantoj 13—17-jaraj kaj plenaĝuloj)

Marija Vaŝĉiŝina — ul. Sadovaja 8-A, kv. 71 (por la Esperanto-Rondo) — Lvovskaja obl. 293511 Morŝin, USSR (gelernantoj 10—15-jaraj)

ESPERANTO-KLUBO ab. k. 1958, 614057 Perm-57, USSR (novaj e-istoj)

PALACO DE PIONIROJ, ESPERANTO-KLUBO, ul. Ĉeljuskincev 46, 624003 Tjumen, USSR (novaj e-istoj, 12—17-jaraj)

Fotul Nikolao — ul. Gorkogo 84 (por la ESPERANTO-KLUBO), 295540 Vinogradov, Zakarpatje, USSR (gelernantoj)

KLUBO DE INTERNACIA AMIKECO — 213722 Ĵornovk, Mogilevskaja obl., Osi-poviĉeskij rajon, USSR (en E-o, rusa kaj franca)

NI FUNEARAS

La 28-an de majo en Varno forpasis

Boris Drenski

77-jara, membro de E-societo „Albatroso“, sindona esperantisto, gvidanto de multaj E-kursoj, arda pacbatalanto.

La 10-an de junio pro aŭtoakcidento pereis

Marija Coĉeva Sâeva

46-jara, aktiva esperantistino el u. Trojan.